ZDRUŽENJE ZA ESPERANTO SLOVENIJE SLOVENIA ESPERANTO-LIGO

# INFORMACIJE INFORMOJ

Leto / jaro 10, št. / n-ro 2 marec / marto 2004

## Vabilo na letno skupščino Združenja za esperanto Slovenije

Št.: 8/04-IO
Datum: 15. 3. 2004
ČLANOM ZDRUŽENJA ZA ESPERANTO SLOVENIJE

**V A B I L O**

Spoštovani!

Sklicujem redno letno Skupščino Združenja za esperanto Slovenije, ki bo **v soboto, 27. marca 2004, ob 10. uri v Ljubljani** v prostoru Oddelka za lokalno samoupravo (nekdanja Krajevna skupnost Ajdovščina), Štefanova 11.

Predlagam naslednji **dnevni red:**

1. Otvoritev in izvolitev organov Skupščine
2. Poročilo o delu, finančno poročilo in poročilo Nadzornega odbora
3. Razprava o poročilih
4. Volitve organov ZES
5. Program dela v letu 2003
6. Sprejem sklepov
7. Razno

Prosim Vas, da se Skupščine udeležite.
Poročilo o delu in Finančno poročilo boste prejeli na začetku Skupščine. V biltenu Informacije / Informoj so objavljena poročila o posameznih prireditvah in dogodkih.

Lep pozdrav!
Predsednik ZES , mag. Janez Jug

## Informoj pri 15a MKR kaj 2a Familia MKR!

Karaj naturemuloj, kiel kutime, kun baldaŭa printempo ankaŭ ĉi jare venas informoj pri ĉi jara **15a MKR** (MontKabana Renkontiĝo)!
Ĉi jara MKR okazos inter 23a kaj 26a de septembro 2004 en Slovenio, en nova junulargastejo en vilaĝo Pliskovica (280 m) apud Sežana en suda Slovenio, nur kelkaj kilometroj for de sloven-itala limo kaj 30 km for de Trieste kaj Adriatika maro.
La programo ĉi jare estas eĉ pli interesa kaj diversa ol kutime:

- vizito al kaverno Skocjanske jame kun grandega subtera kanjono de rivero Reka kaj unu el plej grandaj subteraj ejoj en Eŭropo (la kaverno estas protektita de UNESCO kiel parto de tutmonda natura heredaĵo) ,
- ekskurso al monto Nanos, unu el plej belaj en suda Slovenio, kun plej alta pinto Suhi vrh (1313 m) kaj belega rigardo ekde Alpoj ĝis Adriatika maro,
- ekskurso al monto Vremscica (1026 m) kun grandaj herbejoj kaj bela rigardo,
- ekskurso al malnova mediteranstila vilaĝo Stanjel,
- vingustumado ĉe kamparanoj en vilaĝo Pliskovica.

Ankaŭ menciinde estas ke MKRejo troviĝas en renovigita malnova kamparana domo (kun ĉiu nuntempa komforto) protektita kiel slovena kulturmonumento.

Krome, ĉi jare ankaŭ okazos **2a Familia MKR**, aranĝo por E-familioj (kaj aliaj interesitaj!). La aranĝo okazos inter 21a kaj 23a de majo 2004 en montkabano Ribniška koča (1507 m) sur monto Pohorje en nordorienta Slovenio, proksime al Maribor. La ejo estas atingebla aŭte kaj taŭga por familia umado. Kiel pasintjare la aranĝo ne havas fiksan programon, sed eblas ekskursi al najbara pinto Crni vrh (1543 m, plej alta pinto de Pohorje) kaj Ribniško jezero lageto.
Detalajn informojn (kun prezoj, aliĝilo kaj bildoj de vizitota regiono) trovu je jam konata MKR-retpaĝo http://www.angelfire.com/va2/Vanja/index.html.
Kore salutas vin via MKR-organiza teamo: Mea & Milivoj & Vanja!

## Plantado de olivarbo en Kaŝtelir

Kiel pasintjare, Marĉelo Trampuh el Kaŝtelir (Kaŝtelir estas Istra urbeto proksime al Poreĉ kaj Novigrad) organizas plantadon de olivarbo.
La aranĝo okazos **dimanĉe la 18an de aprilo 2004** kun komenco je la 11a horo. Ankaŭ vi estos bonvenaj!
Ĉi foje unuiĝus ankaŭ samideanoj el Zagrebo. Plantota arbo (nur unu) nomiĝus Dr. L. L. Zamenhof, honore al la kreinto de nia lingvo.
Provizora programo:

- antaŭtagmeze: alveno de gastoj, kafumo (eĉ grappumo), interkonatiĝo kun la bronca vino kaj babilado,
- por tagmanĝo mi proponos lokan restoranon aŭ kiel pasintjare,
- proponita ekskursio al Motovun (Montona),
- posttagmeze alveno de Zagrebanoj kaj plantado de la arbo.

Kore salutas vin Marĉelo (trampuh.marcelo@pu.htnet.hr)

## Lastaj novaĵoj pri la manifestacio Europa Bunto

ĈI-sube la lastaj progresoj koncerne la europan manifestacion pri la lingvo-diverseco de la 9-a de majo 2004 en Strasburgo :

- la TTT-ejo http://europa.bunto.free.fr disponeblas en 41
lingvoj,
- la programo de la manifestacio kun mapo kaj horoj estas nun afiŝita ĉe la paĝo
http://europa.bunto.free.fr/programo.htm: estas antaŭvidita interalie koncerto de la Tuluza kantisto Jean-Marc Leclerc, fama en la libro "Guinness Records" kiel kantisto en la plej granda nombro da lingvoj,
- pli kaj pli da homoj nin kontaktas ĉiutage por anonci al ni sian partoprenon ; kelkaj el la partoprenontaj asocioj estas afiŝitaj ĉe la paĝo
http://europa.bunto.free.fr/asocioj.htm : se vi deziras, ke ni aldonu ligon ankau al la TTT-ejo de via asocio (au organizo), ne hezitu anonci vin plej frue kiel eble al europa.bunto@eraro.com,
- ni starigis reton da kunordigantoj en diversaj landoj kaj regionoj de Europo, kies listo videblas che la pagho http://europa.bunto.free.fr/kontakto.htm,

- organizita kunvveturado http://europa.bunto.free.fr/kunveturado.htm.

Antauplezurante renkontighi kun vi la 9-an de majo 2004 en Strasburgo, jam post 1 kaj duono monato!

Kore salutas,
Sébastien ERHARD,
ĝenerala kunordiganto de la manifestacio

## Universala Kongreso 2006 en Firenze

La estraro de UEA akceptis la inviton de Itala Esperanto-Federacio okazigi la 91-an Universalan Kongreson de Esperanto en Florenco de la 29a de julio ĝis la 5a de aŭgusto 2006.
Italiaj esperantistoj jam komencis labori por ke la kongreso estu epokfara kaj jam la premisoj montras ke certe temos pri tre zorge preparata kongreso.
Fakte en la LKK (landa kongresa komitato) aniĝas internacie konataj aktivuloj, sub la reĝisorado, en la rolo de sekretario, de Diccon Mastermann, iama Konstanta Kongresa Sekretario ĉe UEA kaj poste estrarano de UEA pri kongresoj. La fakto, ke ĉijare li ankaŭ kandidatiĝas kiel B-komitatano montras lian decidon plentempe sindediĉi al esperanto-movado en venontaj jaroj!
Michela Lipari,
Estraranino de IEF, michela.lipari@libero.it

## Esperanta Vikipedio nun entenas 10.000 artikolojn

La esperantlingva fako de la multlingva kunlabore rete verkata enciklopedio 'Vikipedio' atingas dek mil artikolojn ĉiutage verkatajn de kunlaborantoj el pli ol 30 landoj.

Vikipedio estas multlingva projekto kun pli ol 300.000 artikoloj en pli ol 40 lingvoj. Artikoloj samtemaj en diversaj lingvoj estas simple interligitaj tiel ke leganto povas facile transiri de unu lingvo al alia kaj de unu temo al alia. Estas unika ŝanco por Esperanto esti agnoskita kiel monda kleriga kulturlingvo.

Rigardu ĉe http://eo.wikipedia.org.

## Esperanto en Radioj

Trovu la jenajn sondosierojn (en MP3 formato) ĉe http://www.radioarkivo.org.

- China Radio Internacia: 26, 27, 28, 29, 30, 31-jan-2004
- Radio Bronka: 26-jan-2004
- Radio Itala Internacia: 31-jan-2004
- Radio Okcitanio: 29-jan-2004
- Radio Polonia: 26, 27, 28, 29, 30, 31-jan-2004
- Radio Suda Kanalo: 26-jan-2004
- Radio Vatikana: 28, 29-jan-2004

Inter la 26an kaj la 31an de januaro, oni aldonis pli ol 13 horojn da programoj al la arkivujo.

## Fonetika eksperimento en esperanto

Internacia eksperimento, kiu celas priskribi kaj taksi la prononcon en Esperanto, estas grava parto de verkata disertacio pri la norma prononco de nia lingvo internacia, fare de Oksana Burkino, postdiploma studentino ĉe Sankt-Peterburga Ŝtata Universitato. Ŝi petas, ke ĉiuj, kiuj ekdeziras partopreni, dediĉu iom da minutoj por tiu ĉi serioza esploro. - http://sfo.ab.ru/~oxy/.

## Subvencioj por eduki E-instruistojn en Afriko

En aprilo 2004 unuafoje estos disponigataj subvencioj de la nova fondaĵo "Hans", kreita pasintjare por subteni la edukadon de novaj Esperanto-instruistoj en Afriko. La fondaĵo estis starigita memore al Hans ten Hagen (Nederlando 1932-2003). Ĝian komencan kapitalon - 100 mil eŭrojn disponigis nederlandaj familioj ten Hagen-Renses kaj Bakker-ten Hagen.

Pli da informoj vi trovos ĉe http://www.uea.org.

## Vaš kotiček

Nova rubrika v Informacijah je namenjena izmenjavi izkušenj z esperantom, torej lepih vtisov, zanimivosti oz. česarkoli zanimivega, kar bi želeli deliti z drugimi esperantisti. Prispevke pošljite na elektronski ali navaden naslov.

V času od **21. do 28. marca 2004** bo **v Sarajevu, v Bosni in Hercegovini** potekal seminar E@I oziroma **Esperanto ĉe Interreto.**

Namen seminarja je utrditi mednarodno sodelovanje esperanto organizacij iz celega sveta, izmenjati izkušnje poučevanja esperanta, poglobiti znanja in veščine komunikacije v esperantu neposredno v stiku z drugimi esperantisti, se seznaniti z ustvarjanjem internetnih strani ter tokrat tudi pridobiti znanje s področja medkulturnega učenja.

Dodatne informacije najdete na spletni strani http://www.interkulturo.net/seminarioj/sarajevo.

## Sestanki Združenja za esperanto Slovenije

Redni sestanki članov Združenja za esperanto Slovenije iz Ljubljane so vsako prvo in tretjo sredo v mesecu med 18. in 19. uro v prostoru Oddelka za lokalno samoupravo na Štefanovi 9 v Ljubljani. **Naslednji sestanki bodo** 7. **in 21. aprila 2004**. Vabljeni!

## Berite stran 311 na Teletekstu TVS

Še vedno lahko gledalci Televizije Slovenija berejo na strani 311 informacije o esperantu in v esperantu. Vsako vaše pismo bo dokaz, da je za stran zanimanje. Pošljite ga na naslov: Esperanto, Teletekst TVS, Kolodvorska 2-4, 1000 Ljubljana. Po novem je prvega v mesecu nova vsebina, objavljeni pa bodo tudi prispevki, ki bodo prispeli na zgornji naslov prve tri tedne preteklega meseca. Strani ureja Anka Vozlič.

## Prihodnja mednarodna srečanja esperantistov

***Internacia Junulara Kongreso***, Rusija, 10.-17. julij 2004, http://www.tejo.org/ijk

***Universala Kongreso***, Peking, Kitajska, 24.-31. julij 2004, http://www.uea.org

***Martuirsma Internacia Renkontiĝo***, Kroatio, 1.-6. aprilo 2004, http://www.miro.tk

***Internacia Junulara Festivalo***, Italo, 7.-13. aprilo 2004, http://iej.esperanto.it/ijf/2004

***MontKabana Renkontiĝo***, Slovenio, 26.-29. septembro 2004

**INFORMACIJE / INFORMOJ** izdaja / eldonas Združenje za esperanto Slovenije / Slovenia Esperanto-Ligo, Tavčarjeva 2/I, p.p. 1643, SI-1001 Ljubljana, Slovenija / Slovenio. Matična št.: 1205226. Davčna številka: 93737777. Transakcijski račun: 02015-0012704490.